


11 - 12/1982.

/ Dua jaro. /

Adreso : MEZSÖV,  
Békéscsaba, Pf: 10,  
H - 5 6 0 1

Kiel manuskripto - Kézirat gyanánt.

## KUNSIDIS LA KOOPERATIVA ESPERANTO KOMISIONO.

La jarfina kunsido de KEK okazis la 13-an de dec. 1982 en Budapeŝt dum kiu la Komisiono trarigardis la laboron de la jaro 1982 kaj en la borplano fiksis la taskojn de la venonta jaro.

D-ro József Pál prezidanto de KEK parolante pri la okazintaĵoj de la pasinta jaro, rekone menciis la du gravajn arangaĵojn: la Konferenco de Gyula kaj tiun de ICEM en urbo Cegléd. Ambaŭ estis tre signifaj. La Kooperativa Konferenco grave kontribuis al la diskonigo de la celoj kaj perspektivoj de la Koop. E-movado. La vastesfera gazetara eĥo en Budapeŝta Informilo, en la hungarlingva Világ és Nyelv, en la Kooperativa Stelo kaj ankaŭ en multaj aliaj E-revuoj multe helpis diskonigi la okazintaĵojn de la Konferenco kaj ties rezoluciojn; eĉ Radio Polonia raportis pri la evento en sia esperantlingva dissendo. Al la bona informlaboro estas dankebla, ke la Landaj Koop. Asocioj de Argentine kaj Japanio jam aligis al la rezolucio de Gyula kaj ankaŭ la Koop. Sekcio de Eŭropa Komunumo serioze interesigas pri la aligo.

Ĉio ĉi bone pruvas la gravecon de la informlaboro kaj d-ro József Pál elvokis la a

1982.dec.13. -án volt a SZEB évvégi ülése, melyen a Bizottság áttekintette az 1982-es év munkáját és munkatervben rögzítette a jövő esztendő feladatait.

Dr. Pál József a SZEB elnöke az elmúlt év eseményeiről szólva elismeréssel említette a két fontos rendezvényt: a Gyula-i Konferenciát és az ICEM-ét Cegléden. Mindkettő nagyon jelentős volt. A gyulai Szövetkezeti Konferencia jelentékenyen hozzájárult a szöv. eszp. mozgalom célkitűzéseinek és távlatainak megismertetéséhez. A széleskörű sajtóvisszhang a Budapeŝta Informiloban, a magyarnyelvű Világ és Nyelvben, a Kooperativa Steloban és sok más eszp. lapban nagyban segítségünkre volt a Konferencia eseményeinek és határozatának ismertetésében; még a Lengyel Rádió is beszámolt az eseményről eszperantó nyelvű adásában. A jó sajtómunkának köszönhető, hogy már Argentina és Japán orsz. Szöv. Szövetségei csatlakoztak a gyulai határozathoz és az Európai Közösség Szöv. Osztálya is komolyan érdeklődik a csatlakozásról.

Mindez jól bizonyítja a tájékoztatás fontosságát és dr. Pál József felhívta a fi



tenton sisteme informi niejn B.I., V és Ny kaj K.S. pri ĉiuj okazintaĵoj de nia movado.

Simile grava tasko estas elformigi pli kaj pli novajn partnerkontaktojn, similajn al tiuj, kiujn jam havis Várpalota kaj Kardoskut. Tiucelĉe bone estas utiligeblaj la jam ekzistantaj fraturbaj kontaktoj,

Parolante pri la Koop. Konferenco, kiu okazos venontjare en Budapeŝto, enkadre de 68a UK, d-ro József Pál informis la ĉeestantojn: ties dato estos la 2-a de aŭgusto 1983.

La organizantoj atendas al la Konferenco el ĉiu departemento 4-5 esperantistojn el inter kiuj unu havos eblecon raporti pri la koop. E-laboro -maksimume dum 5 minutoj, -kiu okazos en sia departemento.

Kiuj ne povas partopreni la tutan Kongreson samajnon, kaj alvenos nur al la Koop. Konferenco, por tiuj la Konferenco estos senpaga. OSZTĉe en aparta ĉirkuero petos la Kunordigajn Komitatojn ebligigi per libera tago la partoprenon de la koop. esperantistoj kaj la eble enkaŭ finance kontribui al la vojaĝkostoj.

Imre Szabó, sekretario de KEK prezentis la laborplanon el la jaro 1983, kiun la kunido akceptis. La tekston de la laborplano hungarlingve ni konigas en ĉi tiu numero de K.S.

D-ro József Pál fermante la kunsidon deziris al ĉiuj koop. esperantistoj feliĉan Novjaron kaj multajn sukcesojn en ĝi.

gyelmet tájékoztatni a B.I.-t, a V és Ny-t és a K.S.-t mozgalmunk minden eseményéről.

Hasonlóképpen fontos feladat újabb és újabb partnerkapcsolatok kiépítése, hasonlóké, melyeket Várpalota és Kardoskut létesített. Erre a célra jól hasznosíthatók a már meglévő testvérvárosi kapcsolatok.

A jövő évben Budapeŝten, a 68. Nemzetközi E-Kongresszus keretében történő Szöv. Konferenciáról szólva dr. Pál József tájékoztatta a megjelenteket: ennek időpontja 1983. aug. 2 lesz.

A Konferencia szervezői minden megyéből 4-5 eszperantistát várnak, kik közül egynek lehetősége lesz legfeljebb 5 perces beszámolót tartani a megyéjükben folyó szövetkezeti E-munkáról.

Akik nem tudnak résztvenni az egész Kongresszusi héten és csak a Szöv. Konf.-ra érkeznek, azok számára a Konferencián való részvétel ingyenes. Az OSZT. külön körlevélben kéri a Koordinációs Bizottságokat, hogy a szöv. eszperantisták Konferencián leendő részvételét szabadnappal tegyék lehetővé és lehetőség szerint anyagilag is járuljanak hozzá utiköltségeikhez.

Szabó Imre a SZEB titkára előterjesztette az 1983-ra szóló munkatervet, amit az ülés elfogadott. Szövegét magyar nyelven e számunkban ismertetjük.

Dr. Pál József bezárva az ülést minden szövetkezeti eszperantistának boldog Újesztendőt és sok sikert kívánt.

Á. Abonyi-Nagy



## A SZÖVETKEZETI ESZPERANTÓ BIZOTTSÁG TEVÉKENYSÉGI

TERVE 1983-ra.

A SZEB tevékenységében továbbra is a legfőbb célkitűzés, hogy valóra váltsa az OSZT és a MESZ közötti együttműködési megállapodásban foglaltakat. Az aktuális szövetségi és eszperantómozgalmi határozatok szellemében végzi munkáját: a szövetségi eszperantisták szervezését, az eszperantó nemzetközi nyelv terjesztését a szövetségi dolgozók körében, valamint a szövetségi eszme megismertetését, terjesztését, a magyar szövetségi mozgalom eredményeinek népszerűsítését a világ eszperantistái között.

Az 1983. évi tevékenységet alapvetően meghatározza a Budapesten 1983. július 29-augusztus 6 között megrendezendő Eszperantó Világkongresszusra történő felkészülés.

### 1./ Szervezeti kérdések:

- 1.1. A szövetségi eszperantó-csoportok szervesen kapcsolódjanak be az eszperantó mozgalom szervezésébe, erősödjenek tovább a kapcsolatok a megyei szövetségi szövetségek és a megyei eszperantó bizottságok között.
- 1.2. A szövetségi eszperantó csoportok között közvetlen tapasztalatcsere alakuljon ki. Keressék fel tapasztalatgyűjtés céljából a jól működő csoportokat, megyéket.

### 2./ Tájékoztatás - nyelvpropaganda :

- 2.1. Az eszperantó mozgalmi hírek közlésének fő eszköze a Budapesti Informilo. A megyei szövetségi eszperantó életéről kegyon állandó tájékoztatást. Néhány megyében / Hajdu-Bihar, Vas, Zala/ léteznek megyei tájékoztatók, más megyékben pedig körtlevelek. Ezekben is állandóan tájékoztatunk szövetségi eseményeinkről. Küldjünk anyagokat a Kooperativa Stelo-nek.
- 2.2. Adjunk tájékoztatást a megyei Szövetségi Élet nek az eszperantó eseményekről, nyelvtanfolyamokról, stb.
- 2.3. Meg kell jelentetni a szövetségi eszperantó csoportok címjegyzékét. A címeket / csoportok, később csoportá váló tanfolyamok, megyei eszperantó felelősök / kérjük legkésőbb 1983. május 31-ig a SZEB címére megküldeni. / A SZEB címe : Budapest, Pf: 193, 1368. A szerk. /
- 2.4. Javítani kell az információáramlást a megyék és a SZEB között.
- 2.5. A MESZ megyei Bizottságaival együttműködve a szövetségi megyei rendezvényein, nagyobb tömegeket mozgató társadalmi eseményeken tájékoztassunk az eszperantó nyelvről és mozgalomról.



- 2.6. Erősítsük tovább nemzetközi propogandánkat a nemzetközi eszperantó sajtóban. / Ismertessük meg eredményeinket, készítsünk fordításokat át fogó cikkek~~ből~~, tájékoztassunk a szövetségi eszperantó eseményekről./
- 2.7. A 68.Eszperantó Világkongresszus alkalmából a Szövetségi Eszperantó Bizottság az OSZT támogatásával ismertetőt jelentet meg a magyar szövetségi mozgalomról

### 3./ Oktatás :

- 3.1. A ME3Z megyei Bizottságának oktatási felelősé - vel együttműködve biztosítani kell a megyei szövetségi dolgozók számára az eszperantó nyelv elsajátításának lehetőségét. Propagáljuk a központi levelező nyelvtanfolyamot.
- 3.2. Az Országos Oktatástechnikai Központ el kívánja készíteni az állami nyelvvizsgára felkészítő eszperantó-nyelvi anyagot. / 10 db. 15 perces színes video-film, ára 28.600.- Ft. / A SZEB - hez a megyék küldjék meg igényeiket 1983.jan. 31.-ig.
- 3.3. Törekedjünk arra, hogy az Eszperantó Világkongresszusig legalább 5 szövetségi dolgozó beszéd-készségi szinten elsajátítsa a nyelvet azokban a megyékben is, ahol mostanáig még nem szerveztek tanfolyamot.

### 4./ Nemzetközi tevékenység :

- 4.1. 1983-ban Magyarországon rendezik az Eszperantó Világkongresszust, amelynek keretében - előre - láthatóan augusztus 2.-án - Szövetségi Napot tartunk. A megyék erre az eseményre 4-6 főt küldjenek, valamint készüljenek fel hozzászólásra.
- 4.2. Az Eszperantó Világkongresszus egész időtartamára mennél több résztvevőt szervezzünk.
- 4.3. Kétoldalu kapcsolatainkat erősítsük megyei szinten is, kiaknázva a testvérvárosi kapcsolatokat.
- 4.4. A nemzetközi szövetségi eszperantó együttműködés kereteit kiépítjük.
- 4.5. A nemzetközi kapcsolatok kiépítésére kész megyék folyamatosan jelezzék szándékukat a SZEB-nek.

### 5./ Egyéb :

- 5.1. A Nemzetközi Szövetségi Nap keretében folytatjuk tevékenységünket az eszperantó érdekében.
- 5.2. Szorgalmazzuk a nemzetközi eszperantó szövetségi terminológiai munka gyorsítását.



## ESTONA KONSUMKOOPERADO 80-JARA.

La unuaj Rochdale /Roĉdeil/-tipaj konsumkooperativoj en Estonio fondiĝis en la fino de la 1902-a jaro. Kiel la unua sukceso malfermi sian vendejon la societo de varkonsumantoj-laboristoj de la tekstilfabriko en Sindi /apud Pärnu/. Ĝia celo estis vendi al laboristoj mangovarojn kun malpli altaj prezoj ol tion faris privataj butikistoj, bremsi la uzuradon de la lastaj. La dua, t.n. ekonomia societo de kampuloj en Antsla, vendis sian unuan varpartion - salon kaj felcilojn - en la komenco de 1903.

Ĉar la unuaj kooperativoj agadis sukcese, fondiĝis baldaŭ, precipe en la unua jardeko, multaj novaj. En 1919 ekagadis en la juna burĝa respubliko ankaŭ ekonomia kaj idea organiza centra ligo de Estonaj Konsumkooperativoj, kies agado stabiligis kaj multe plievoluigis la kooperativan movadon. En 1940 - la lasta jaro de la burĝa respubliko - en Estonio agadis 150 konsumkooperativoj kun 450 vendejoj kaj 48.000 membroj. Plejmulto de la kooperativoj havis nur unu vendejon. Samtempe ilia respublika centro disvolvis ankaŭ vastan produktadon de konsumvaroj, eĉ produktiloj de kampo - permastrumado. Konsumkooperado okupis 25 %-ojn de la tuta detalvenda merkato en la respubliko.

Vasta disflorado komenciĝis post la fino de la dua mondmilito, en la kondiĉoj de la socialisma rekonstruado. La nuna estona konsumkooperado prezentas el si altnivelan komercan kaj industriajn ekonomian agadon. Al ĝia membraro apartenas 430 mil personoj, do fakte la tuta plenkreska loĝantaro en kamparo kaj krom la plej grandaj respublikaj urboj. La 25 kooperativoj havas pli ol du mil vendejojn kaj managejojn, vastan reton de scetopunktoj por kamparmastrumaj produktoj. La meza jara vendosumo de unu kooperativo estas 32 milionoj da rubloj. Industriaj entreprenoj produktas varojn kaj instalaĵojn por aliaj kooperaj organizaĵoj en Sovetio por 120 milionoj da rubloj. Altan evoluŝtupon montas ankaŭ en 1947 komenciĝinta kamparmastruma kooperado, kiu havas sian propran centran organizaĵon.

La kooperativo de Sindi unuiĝis en 60-aj jaroj kun la kooperativo de Pärnu. Ĝi havas nun 119 vendejojn kaj 47 managejojn kun jara detalvenda sumo 43 milionoj da rubloj. La kooperativo de Antsla, unu el la plej malgrandaj, havas 42 vendejojn kaj 10 managejojn kun 13-miliona jara vendosumo.

La estona konsumkooperado okupas elstaran lokon en la tutsoveta kooperado kaj estas bona ekzemplo pri vivoforto kaj kapabloj de la kooperativa movado generale. Bonajn kontaktojn ĝi havas ankaŭ kun la centra organizaĵo de la hungaraj kooperativoj.

Jaak Ojala  
emerita kooperano.  
T e l l i n n

-----  
ANKAŬ VIAJ ARTIKOLOJ ESTAS BONVENIGITAJ EN LA KOOPERATIVA  
STELO !  
-----



" ESPERANTON EN LA KOOPERATIVOJN ! "

Kion faras niaj bulgaraj amikoj??

Post la Konferenco de Gyula krom vastasfera gazetara laboro okazis du gravaj paŝoj en Bulgario, kies celo: efektiviigi la komunan sloganon de la kooperativaj esperantistoj "Esperanton en la kooperativojn".

La Kooperativa E-Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio en sia 19-a cirkulero / datita la 25-an de aŭg. 1982 / konigis la okazintaĵojn de la Kongreso en Gyulanyojn, kaj la tie akceptitan rezolucion. La cirkulero en 5 punktoj resumis la plej gravajn kaj urgajn faktojn. Efektive ĝi estas bone pripensita kaj prilaborita laborplano, kiu celas kiel eble la plej rapide disvolvi la kooperativan E-movadon en Bulgario.

La cirkulero informas nin, ke niaj bulgaraj amikoj reorganizis ankaŭ la estraron de la Koop.E-Sekcio. Prof-on Lazar Ralĉev oni elektis kiel honoran prezidanton. La nova prezidanto estas Milan Milanov kaj la ĝenerala sekretario Dimitar Mutusev.

LA KOOPERATIVA ESPERANTO KOMISIONO DE NKHKOOP KAJ HEA TUTEKORE SALUTAS LA NOVAN ESTRARON DE LA BULGARA KOOPERATIVA ESPERANTO-SEKCIO KAJ DEZIRAS AL ILI SUKCESPLENAN LABORON.

La menciitan cirkuleron la 24-an de sept. 1982 sekvis alia, kiun jam eldonis la nova estraro de KES ĉe la Centra Koop.Asocio de Bulgario. La kompletan tekston de la cikulero ni publikigas :

„Estimataj Samideanoj,

Per tiu ĉi cirkulero ni atentigas vin pri la Ĝenerala

A gyulai Konferencia ŭtán a széleskörű sajtómunkán kívül Bulgáriában két fontos lépés történt a szöv. esperantisták közös jelszavának, az "Esperantót a szöv. szervezetekbe" megvalósítása érdekében.

A Bulgar Esperantista Szövetség E.Szöv.Osztálya 19.sz. körlevelében / 1982.aug. 25.-i kelttel / ismertette a gyulai Konferencia eseményeit, valamint az ott elfogadott határozatot. A körlevél 5 pontban foglalja össze a legfontosabb és leg-sürgősebb tennivalókat. Valójában jól átgondolt és jól kidolgozott munkaterv ez, mely bulgáriai szöv.E-mozgalom lehető leggyorsabb kibontakoztatását tűzte ki célul.

A körlevél tájékoztatása szerint bulgar barátaink át szervezték a Szöv.E-Sekcio vezetőségét. Lazar Ralĉev prof-ot tiszteletbeli elnök ké választották. Az új elnök Milan Milanov és a főtitkár Dimitar Mutusev.

Az említett körlevelet 1982.szept.24.-én egy másik követte, melyet már a CKU Szöv.E-Sekciójának új vezetősége adott ki. Ennek teljes szövegét az alábbiakban adjuk :



Alvoko de la Kooperativa Esperanto-Sekcio ĉe la Bulgara Esperantista Asocio kaj la Kooperativa Esperanto-Komisiono ĉe la Hungara Esperanto-Asocio, kaj ankaŭ pri la Rezolucio de la IX-a Kongreso de la Centra Kooperativa Unuiĝo en Bulgario. Ni gvidas nin de la konvinko, ke la estigo de kontaktoj kun vi efikas favore sur la entreprenitan iniciaton pri la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto inter la kooperativaj unuiĝoj, ekonomiaj organizoj kaj kooperativoj - komunumaj, produktadaj kaj komercastrumaj.

Ni akceptus kun kontenteco unu pozitivan rilaton de vi pri la kreado de specialigita organizo sub titolo Internacia Kooperativa Esperantista Ligo / IKEL /. Unu anticipa intersaĝo de opinioj kaj starpunktoj pri la celoj, la taskoj, la strukturo kaj la organizaj principoj de la nova organizo kontribuos multe por la ellaborado kaj la akcepto de konvena statuto kun ĉiuj demandoj inkluditaj en ĝin, kiuj kontribuos por la konstruado kaj la fortikigo de la internacia kooperativa esperantista movado. Antaŭ ni staras por solvado gravaj problemoj, sed ni kredas, ke per komunaj klopodoj de ĉiuj kooperativoj kaj kooperativanoj, kiuj volonte orientigos al la lernado de la Internacia Lingvo Esperanto, ni atingos progreson en ĝia utiligado por profesiaj celoj.

Ni tre dankos al vi, se vi informos nin, ĉu la Rezolucio estas utila por vi en la kooperativa sfero. Ni atendas viajn proponojn pri precizigo kaj ellaborado de la kooperativa terminaro.

Generala Sekretario  
de KES:

/ Dim. Mutuŝev pm. /

Prezidanto de KES:

/ M. Milanov pm. /

K R O N I K O.

FORPISIS F-INO NORAH DALE.

Granda perdo trafis la Kooperativan E-movadon. La 4-an de novembro en angla urbo Worthing forpISIS F-ino Norah Dale.

En nia pli anteaŭa numero ŝi ankoraŭ sendis salutojn al ni, skribis pri si mem kaj pri siaj planoj rilate al disvastigo de Esperanto pere de TUCEG; sed ŝi jam neniam povos efektiviĝi siajn planojn.

Sia forpaso estas granda perdo ne nur al TUCEG, sed ankaŭ al la Internacia Kooperativa E-Movado, por kies sukceso entuziasme ŝi laboris kaj per agoj kaj per plumo.

La memoro de ŝia aminda

kaj oferema personeco restos viva ankaŭ en la rondoj de la kooperativaj esperantistoj.

La Redakcio de K.S.

DANKON AL ESTERANTO-DISAŬDIGO DE RADIO POLONIA.

En la "Leterkesto" de la E-disaŭdigo de Radio Polonia la 5-an kaj 6-an de sept. diĝis konigis informojn pri nia 20-a Jubilea SEU kaj pri la Kooperativa Konferenco. S-ro Jan Klimek estro de la Redakcio esprimis sian ŝojon, ke SEU zorgas pri rememorigado de la bonaj E-tradicioj.



## SALUTO DE LA 75AJARA ESPERANTO-MOVADO EN BÉKÉSCSABA.

La URBA GRUPO de Békés - csaba la 12-an de dec. 1982 aranĝis la memorkunsidon okaze de 75-jara datreveno de la loka E-movado. La okazintaĵon aranĝita en la Junulara kaj Pionirdomo ĉeestis d-ro László Virág, gvidanto de la Kleriga Sekcio ĉe la Urba Konsilantaro, Imre Szabó org.sekr. de MESZ, kaj Zsolt Gyarmathy sekr. de Békés dep-a E-Komitato. La jubileanta E-Grupo ricevis salutotelegramojn kaj leterojn, kiujn ili kore dankas.

Pri la memorkunsido en la loka ĵurnalo Békés megyei Népujság raportis Julianna Számedó.

## ARTIKOLO DE D-RO BALÁZS SZEMŐK EN LA REVUO "NOVAĴOJ DE LA AGROKULTURA PRODUKTA KOOPERATIVO "ORA CERVO" DE TÁPIÓSZENTMÁRTON."

La partoprenantoj de ICEM-Kongreso de Cegléd la 21an de julio vizitis la Agrokulturan Koop-on ORA CERVO en vilaĝo Tápiószentmárton, kie ili vizitis infanĝardenon, poste partoprenis komunan tagmanĝon, post kiu la prezidento de la vilaĝa Konsilantaro Vilmos Farkas, kaj János Szabó prezidento de ORA CERVO parolis pri la historioj de la vilaĝo kaj pri ties Agr.Prod.Kooperativo. La ICEM-konferencanoj vizitis la bienegon de ORA Cervo; post kiu grandan sukceson rikoltis la ĉevala prezentado.

Ĉe fino de sia artikolo d-ro Balázs Szemők rimarkas, ke li volonte gvidus la ko-

operativenojn, partoprenantojn de la venontjara Kooperativa Konferenco dum la 68-a UK en la ORA CERVO de Tápiószentmárton.

Konsiderinde propono !

## "VERDA STELO" NIA PLEJ AKTIVA KOOPERATIVA E-GRUPO

La 30an de oktobro aranĝis klub-vesperon kiun partoprenis preskaŭ cent personoj. En la programo de la klub-vespero la Amatora Teatra Ensemblo de urbo Sopron grandsukcese ludis la teatraĵon de Frigyes Karinthy : Mi repetas la lernejkotizon.

La sukceson de la Szombathely-anoj pligravigas, ke ili vastasfere popularigas nian movadon, konigas ties laboron, skirante novajn adertojn kaj anojn por nia Esperanto.

Kooperativa Stelo kore deziras pluajn sukcesojn al la bona laboro de "Verda Stelo de Szombathely !

## VARE - 1983 EN KUBRAT OKAZOS LASTSABATE DE JANUARO !

La jam tradicia VARE-RENKONTIĜO ankaŭ ĉijare okazos en la ĉarma bulgara urbeto Kubrat.

Ĝenerale konata estas, ke ĉi tiu urbeto estis la lulilo de nia kooperativa E-movado, kaj la aranĝanto de VARE estas nia konata kaj populara amiko Anton Antonov. Kiu deziras partopreni la tritagan aranĝaĵon petu informojn de Kooperativa Stelo.

ALVOKO ! Universitatano el GDR serĉas fakulon pri fiŝbredado kaj fiŝkaptado. Interesigantoj bonvolu skribi al Kooperativa Stelo.



MI ESTIS EN SCHWARZENBERG.

Kooperativa Stelo paroladas kun f-ino Ági Laurinyecz pri sia unua vojaĝo eksterlanden pere de Esperanto.

Budapeŝta Informilo kaj Kooperativa Stelo siatempe raportis pri la Kooperativaj E-kursoj, kiuj dum la lernojaro 1981/82 okazis en tri urboj kaj sep vilaĝoj de dep. Békés helpe de morala kaj financa kontribuo de la Kunordiga Komitato de Békés Dep-aj Kooperativoj.

Unu el tiuj vilaĝoj estis Kondoros, kie en aranĝado de la loka Sparkasa Kooperativa anoj de la kvar diverstipaj kooperativoj / Sparkasa, Konsuma, Agrokultura kaj Industria, / diligente lernis Esperanton sub lerta gvido de József Wagner. Laŭkutime, kiam la gelernantoj en certa nivelo alproprigis la lingvon, la kursgvidanto kunligis iliĝn kun eksterlandaj esperantistoj.

Leteroj iris, leteroj venis; komenciĝis vigla korespondado kaj inter aliaj la kursgvidanto ricevis invitilon el G.D.R., al la V-a Internacia Turisma Renkontiĝo, okazonta inter la 6-a kaj 10-a de oktobro en la urbeto Schwarzenberg.

La Renkontiĝon partoprenis f-ino Ági Laurinyecz, la ĵuna gvidantino de Sparkasa Kooperativo en Kétsoprony. Ĉar por malnovaj esperantistoj la etoso de niaj renkontiĝoj jam estas tute natura, Kooperativa Stelo demandis do sin kiu unue partoprenis esperantistan aranĝaĵon.

Demando : Kiel mi estas informita, tamen ne ĉi tiu vojaĝo estis la unua, kiun vi faris eksterlanden.

Respondo: Vere. Mi jam estis en Ĉeĥoslovakio, Italio, Jugoslavio, FGR kaj GDR, krome mi vizitis ankaŭ Pollandon.

Demando : Ĉar vi jam estas sperta vojaĝanto, ĉu vi spertis diferencon inter viaj pli antaŭaj kaj la nuna vojaĝo, kiu okazis helpe de Esperanto ?

Respondo: Kvankam mi estas "nur komencanto" kaj mia lingvoscio tute ne estas nomebla "perfekta" - ja pro mia troa okupiteco mi ofte ne povis partopreni la kurshorojn - mi tamen asertas: la diferenco kiel inter ĉielo kaj tero. Vi certe komprenas kia travivaĵo estis por mi - kiu ĝis nun ĉiam kaj ĉie bezonis la ofte malprecizan helpon de interpretistoj - paroli senpere kun gefiloj de kvar-kvin diversaj nacioj, kies lingvojn alproprigi nur supraĵe necesus por mi minimume 5-6 jaroj !

Demando : Ĉu vi bonvolus paroli pri la vojaĝo ?

Respondo: Jes ! Mia surprizo jam komenciĝis dum la vojaĝo. Kiel vi scias mi vojaĝis kune kun la grupanoj de Békéscsaba, kun s-inoj Ida Palovits, Elizabeta Rajki kaj OĉjoKarlo Forster. Mem la vojaĝo estis agrabla, sed alvenante la Ĉeĥoslovakon ĉefurbon trafis min la unua surprizo. Ĉe la stacidomo de Praha atendis nin korespondamiko de s-ino Ida Palovits, kiu prezentis al ni la fortikaĵon Hradčany, multajn malnovajn preĝejojn, la Konsilantaran Domon, la







eĉ helpe de nia kara gastiganto d-ro Werner, ni vidis ankaŭ pli multon, ol troviĝis en la programo. Ekzemple en Waschleithe ni vidis la carmegan "Heimatstück", kiu estas liber eera ekspozicio kaj mi havis la senton, kvazaŭ mi promenuŝ en Liliputlando.

Demando: Kio pleje plaĉis al vi en G.D.R. ?

Respondo: Pardonu, sed antaŭ ol respondi al ĉi tiu demando, mi nepre devas menciigi per kelkaj vortoj la riĉan kaj bon - gustan nutradon dum la Renkontigo, kiurilate mi devas esprimi mian dankon.

Respondi al via demando, kio pleje plaĉis al mi en G.D.R. la respondo tute ne estas facila ! Se mi diras, ke ĉio plaĉis al mi, per ĝi mi diras banalaĵon. Se vi permesas mi pro vos denombri ilin. Plaĉis al mi la belega urbeto Schwarzenberg, ĉirkaŭita per montoj, arbaroj. La harmonio inter la malnovaj ligno-trusaj kaj modernaj domoj. La multaj floroj kiuj ornamas ne nur la balkonojn kaj fenestrojn de la domoj sed troviĝas kaj en muzeoj kaj en magazenoj. Aparte impresis min la altaivele logejkulturo de G.D.R.. La meblaro estas moderna kaj laŭcela. Sed mi povus denombri senfine la plej diversajn miajn konstatojn ... do mi tamen devas fini mian respondon per generalaĵo: ĉio plaĉas al mi en G.D.R.

Demando : Do nenio malbona estis dum la vojaĝo, dum la Renkontigo, sekve ĉio estis bona. Sed kiel mi scias vi vizitis ankaŭ la ĉeĥoslovakian urbon Karlovy Vary. Tie kio okazis ?

Respondo: Ankaŭ tie estis bona, sed tie ni ne restadis longe. Sed ankaŭ de tie mi havas travivaĵon: la Alvokon de la kara Alena Klementová "Estu Paco !". Nur et-etan malĝajan konstaton: nek en G.D.R., nek en Ĉeĥoslovakio sukcesis renkonti esperantistan kooperativanon. Mi tamen esperas, ke venontjare mi sukcesos, ja bonege estus dum tia amikeca renkontigo fari ankaŭ sperto-interŝanĝon.

Demando : Se mi bone komprenas ankaŭ venontjare vi deziras partopreni esperantistan renkontigon ?

Respondo: Nepre ! Kun esperantistoj kaj al esperantistoj mi ĉiam volonte ekskursos laŭ miaj spertoj, ja jam ankaŭ mi iĝis esperantisto ...

Demando : Ĉu estis utila lerni Esperanton ?

Respondo : Jes, unusence jes ! Kvankam mi jam estis en G.D.R. nun mi tamen vidis pli multon, kiel pli antaŭ. Dankeme mi pensas al k-doĵ d-ro Werner kaj Eichler kaj mi jam scias ankaŭ venontjare mi vizitos G.D.R.-on.

Mi dankas la intervjuon.

- nyár -

-----  
K.S. PARDONPETAS KE EL ĈI TIU NUMERO FORRESTIS LA DIALOGO DE MARIA KAJ ANDREO PRO MANKO DE LOKO. VENONTJARE NI DEFOVE RENKONTOS ILIN.  
-----



- K I O N O N I S K R I B A S P R I N I ? -

Békés megyei Népujság / 1982.dec.14 / :

Jubiláló eszperantisták. / Számadó Julianna /

Hungara Vivo / 1982/3.szám / :

Gyula - urbo de SEU. / Á.Abonyi-Nagy /

Budapeŝta Informilo / 1982.szept. / :

Rezolucio de la Kooperativa Konferenco. / - /  
La Kooperativa Konferenco sukcese plenumis  
sian taskon. / Á.Abonyi-Nagy /

/ 1982.okt. / :-

Vizito de Freinet-pedagogoj en Tápíószentmárton.  
/ D-ro Balázs Szemők /

/ 1982.nov. / :

Kooperativej informoj el Bulgario. / Dimitar  
Mutuŝev /

/ 1982.dec. / :

ICEM-renkontigo en urbo Cegléd. / - nyár - /

MONATO / 1982/6-7 n-roj / :

Comera Esperanto-Universitato de Gyula.  
Intervjuo kun d-ro János Herjeczki. / Á.Abonyi-  
Nagy /

Esperantisto Slovake / 1982/ 10 n-ro / :

Jubiles SEU. / Eva Benická /

/ 1982/ 11-a n-ro / :

La 1-a Internacia Kooperativa Konferenco.  
/ Á.Abonyi-Nagy /

Co-operative News / 1982.máj.26 / :

Esperanto session. A special co-operative conference  
in Hungary. / Kun bildo pri la koop.E-  
kurso en Serkad. / / Norah Dale /

Esperanto News / 1982.máj-juni. / :

20th jubilee summer esperanto university in  
Gyula / Sen nomo /

Brighton Co-operative Society / 1982.junio / :

Miss Dale kaj Mr.Harrison of the Trade Union  
and Co-operative E-Group have ben invited to  
speak at the 20th Summer University be held  
in Gyula. / Sen nomo /

Vilég és Nyelv / 1982/6.szám / :

Kilenc ország képviselőinek tanácskozása a  
nemzetközi szövetségi mozgalom új hajtá-  
sáról, új lehetőségeiről. / Abonyi-N. Á. /



Kereskedelem - Technika / 1982/10.szám / 9

Modern nevelési megállások találkozásai. / Beszámoló a Cegléd-i ICEM konferenciáról. /  
/ Név nélkül /

Aranyservas Mg.Tsz.Hiradója / Tápíószentmárton /

/ 1982/4.szám / :

Közös ügyünk a szövetkezet. / Dr.Szemők Balázs /

---

MALNOVAJ HUMORAJOJ NE EKZISTAS ... POR BEBOJ ĈIUJ ESTAS  
NOVAJ !

Mekredebla diferenco !

Post somere pluvego trijaraj knabino kaj knabo ludas apud marĉeto. Por eviti la malpurigon de siaj vestaĵoj ili sin malvestas. Kiam ili staras tute nude unu kontraŭ la alia, la knabino mire kunfrepas siajn manplatojn kaj ekkries :

- Kiel interese ! Mi neniam estus kredinta, ke tiel granda estas la diferenco inter katolikoj kaj protestantoj !  
/ El Ĉiu Ĉiun de Theo Jung /

Grava trompiĝo.

Rabisto : Ne timu sinjorino, mi volas nur vian monon !  
Maljuna fraŭlino : Do, ankaŭ vi similas al la aliaj viroj !

La fileto de la ĉasisto.

Steĉjo trovas piprograjneton en la tripkolbeso. Dum kelka tempo li zorgeme esploras ĝin, poste demandas la patron :

- Paĉjo ! Ĉu per ĉi tiu ŝroto oni mortpafis la tripkolbeson ?

La barko de Noah.

Plenstopita buso staras ĉe la haltejo. Afektema junulino rigardas en la buson kaj spritante demandas :

- Ĉu estas tute plena ĉi barko de Noah ?  
- Venu trankvile fraŭlino jam nur ansero mankas - diras iu el la vojaĝantoj.

Superflua lukso.

- Mi volas aĉeti trinkujon por mia hundo - diras virino al la vendisto.  
- Jen tre ĉarma ujo en kiun eĉ estas skribita: "La trinkujo de la hundeto", por eviti ĝian uzon al alia celo.  
- La subskribe tute superfluas pro du kaŭzoj - respondas eplombe la virino. Ja mia edzo neniam trinkes ekvon, kaj mia hundo ne povas legi.



Ĉe la kuracisto.

Juna fraŭlino sin turnas al simile juna, sed jam reputacion havanta kuracisto per kelkaj plendoj. La kuracisto zorgeme ekzamenas ŝin, poste diras :

-Fraŭlino vi devas edziniĝi kiel eble plej baldaŭ.

-Ĉu vi jam havas edzinon sinjoro doktoro ? - kokete respondas ŝi la demandon.

-Kera fraŭlino, nia devo estas konstati la malsanon kaj skribi la recepton, sed la medikamenton devas preni la paciento mem - respondis la kuracisto.

-----  
PRI ĈIUJ ESPERANTO RILATAJ KOOPERATIVAJ OKAZINTAĴOJ BONVO  
LU TUJ INFORMI "KOOPERATIVA STELO"-N !  
-----

"KOOPERATIVA STELO" KAJ LA REDAKTANTOJ TUTKORE DANKAS LA RICEVITAJN BONDEZIROJN OKAZE DE NOVJARO.

NI PARDONPETAS, KE NI NE POVIS DANKI LA BONDEZIROJN APARTE AL ĈIUJ KAJ NUR NUN, - IOM MALFRUE TAMEN KUN SINCERA KORO - RECIPROKAS TIUJN DEZIRANTE AL ĈIUJ NIAJ KARAJ KUN LABORANTOJ, GEAMIKOJ KAJ GEKOLEGOJ FELIĈEGAN KAJ PROSPERAN NOVJARON, MULTAJN SUKCESOJN EN NIA KOMUNA KLOPODO.

=====